



Miaj amataj sunfloroj

Kiam mi vidas sunflorojn, mi ekridetas.

Kiam mi vidas sunflorojn, mi ekvigliĝas.

Kiam mi vidas sunflorojn, mia koro varmiĝas.

Sunfloroj en Ukrainio donadis al la ukrainoj

Ridetojn, vigliĝon kaj varman koron.

Nun ili krome donu al ili,

Al la idoj de bravaj kozakoj,

Pli da kuraĝo kaj pli da fiero.

Sunfloroj ĉiam gardu la ukrainojn,

Ĝis ili havos perfektan liberecon.



Hej, Puçjo !

Hej, Puçjo, rigardu !
Domoj disfalis per bomboj.
Ukrainoj estas delokitaj de siaj hejmoj.
Venu ĉe min kaj rigardu **miajn sangajn manojn**.
Ĉu vi povas manpremi kun **tia mano**?
Ĉu vi povas brakumi min **tiel sangoŝmiritan**?

Hej, Puçjo Venu.
Rigardu min per viaj propraj okuloj.
Vi povas vidi la estontecon, kiun vi faras ĉi tie.
Jen la tero, kiun vi malbeligas.
Kien iros la bela tero?

Hej, Puçjo, vi sciu !
Vi igas la mondon tiel nigra.
Vi faras marĉan mondon, kie oni nenion povas vidi.

Hej, Puçjo, tamen mi povas vidi maldikan lumradion.
Mi volas vidi ĝin kun vi.
Ni iru por kapti la lumon nun.
Vi ĉesu batali kaj estu preta.
Ni, la homaro, certe kaptu tiun radion, lumon,
kaj pacan mondon !



Mi

Jamamoto Akiko

戦争としている時ではない！

Nun ne estas tempo militi!

地球温暖化に目を向けよ
Vidu tutmondan varmig^on
大気中の炭素を減らせ
Malpliigu karbonon en aero
愚かな戦争するでない
Ne okazigu stultan militon
質素な暮らしを心掛け、
Dau^rigu malluksan vivmanieron,
子孫につけを遺すなよ
kaj ne restigu s^uldon al idaro
既にツンドラ地方は解け始め
Jam tundra regiono ekdegelis,
メタンガスが噴き出して
kaj metangasa erupcio komencig^{is},
温暖化の進行が著しい
kaj irado de varmig^o estas intensega



Kitao

Ridetoj de infanoj

Ridetoj de infanoj
estas sunfloroj.

Ridetoj de infanoj
estas amo.

Ridetoj de infanoj
estas feliĉo.

Ridetoj de infanoj
estas paco.

Ito Junko



Nia terглоbo, la sunfloro

**Nia terглоbo, la sunfloro,
La posedajo de ĉiuj vivajoj,
Sur ĝi ni vivis trankvile kaj
harmonie.**

**Nia terглоbo, la sunfloro,
La posedajo de ĉiuj vivajoj,
Sen ĝi ni ĉiuj ne povus vivi.**

**Nia terглоbo, la sunfloro,
Ĝi ne estas posedajo de la
diktatoro,
Ĝi ne estu detruita!**

**Nia terглоbo, la sunfloro,
La posedajo de ĉiuj vivajoj,
Ni ĉiuj amas ĝin,**

**Kial ni ne kuniĝu por
protekti ĝin?
Ĉiuj pacamaj homoj kaj
pacmaj vivajoj!**



HORI Jasuo

我が地球、我がひまわり

我が地球、我がひまわり
全ての生き物の所有物、
すべてが仲良く生きてきた。

我が地球、我がひまわり
全ての生き物の所有物
なければだれも生きてゆけない。

我が地球、我がひまわり
独裁者の所有物ではない、
その破壊は許せない。

我が地球、我がひまわり
全ての生き物の所有物、
だれもがそれを愛おしむ。

団結し守ろうよ、ひまわりを、
平和を愛する人々よ、
平和を愛するすべての生き物よ。